Francilia esperanta federacio

Ĝenerala Asembleo 2023

ĜENERALAĴOJ

La oficiala jarkunsido 2023 de la francilia federacio de esperanto okazas sabaton la 18an de marto je la 10a matene. Ĝi okazas mikse: kaj rete, kaj surloke en la sidejo. Entute 21 membroj partoprenas: 8 rete, 13 en la sidejo.

REZULTOJ DE LA VOĈDONADO

La membroj povis voĉdoni rete per la retejo balotilo.org, krom 6 membroj, kiuj povis voĉdoni poŝte. La voĉdonado finiĝis la 17-an de marto matene. La celo de la baloto estis aprobi la agadraporton 2022-2023 kaj la financan raporton 2022, kaj elekti novan komitaton. La du raportoj legeblas en nia retejo ĉe https://esperanto.paris/membro-kunvenoj

Ricevintoj de balotilo: 106 rete kaj 6 poŝte, entute 112

Voĉdonintoj: 60 rete kaj 1 poŝte, entute 61

Elcento de partopreno: 54 %

Aprobo de la agadraporto: 53 aprobas, 1 ne aprobas, 7 sindetenas. Konklude la agadraporto estas aprobita.

Aprobo de la financa raporto: 51 aprobas, 2 ne aprobas, 8 sindetenas. Konklude la financa raporto estas aprobita.

Elekto de nova komitato:

La komitato enhavu inter 9 kaj 15 membrojn. Cetere, la kandidato devas esti aprobita de almenaŭ la duono de la voĉdonintoj, tio estas ricevi almenaŭ 31 voĉojn.

- Raymonde Coquisart: 57 voĉoj
- Pierre Gauthier: 56 voĉoj
- Marc Giraud: 54 voĉoj
- Didier Janot: 53 voĉoj
- Aleks Kadar: 53 voĉoj
- Aurélien Lestage: 55 voĉoj
- François Lo Jacomo: 56 voĉoj
- Didier Loison: 56 voĉoj
- Kevin Morel-Fourrier: 46 voĉoj
- Laure Patas d'Illiers: 57 voĉoj
- Marianne Pierquin: 57 voĉoj
- Guillaume Vera-Navas: 52 voĉoj

Konklude, ĉiuj kandidatoj estas elektitaj. Gratulon al la nova komitato.

EVENTOJ DE LA PASINTA JARO

La eventoj de la pasinta jaro estas priskribitaj en la agadraporto. Ilin prezentas la prezidanto kaj la prizorgantaj komitatanoj. La komitato petas de la partoprenantoj iliajn rimarkojn pri la organizitaj eventoj.

FINANCOJ

La financa raporto estas prezentata de la kasisto.

Espéranto-France plialtigis siajn kotizojn, sed ne altigis la sumon dispartigitan al la regionaj federacioj. Antaŭe ni ricevis 10% de la landa kotizo, nun ni ricevas la saman sumon kiel antaŭe, malgraŭ la plialtigo de la landa kotizo.

La komitato de nia federacio malkontentas kaj serĉas solvon por konservi la tiaman nivelon de transpagoj:

1. insiste peti 10% de la nova landa kotizo
2. oficiale iĝi loka klubo kaj per tio ni ricevos pli altan elcenton ol 10% de la landa kotizo
3. krei novan lokan klubon en Parizo

Pri la 2-a solvo: ne klaras ĉu necesus modifi nian statuton; krome, tiukaze, Espéranto-France dezirus diskuti pri lupago por uzi la sidejon.

Pri la 3-a solvo: tio kreus trian nivelon kaj pezan administraĵon.

La asembleo laŭ ĝenerala interkonsento deziras la 1-an solvon.

Espéranto-France pagas ĉiujn elspezojn de la sidejo, inkluzive asekuron de la loko, sed ĝi ne pagas asekuron pri la eventoj organizitaj de la aliaj asocioj.

=> La komitato informiĝu pri specifa asekuro de niaj eventoj.

AGADPLANO

La agadplano por la venonta jaro videblos kun la raportoj en https://esperanto.paris/membro-kunvenoj La prezidanto prezentas ĝin kaj petas la partoprenantojn pri ideoj, helpoj por nunaj agadoj kaj novaj projektoj.

Mundolingua organizos, en la konstruaĵo "La Halle des Blancs-Manteaux" en Parizo, en septembro 2023, foiron pri lingvoj ("Linguafest") kaj ofertas duonprezan budon al asocioj je 1.000€.

=> Ni serĉu alia(j)n asocio(j)n por dividi la koston kaj kune deĵori.

Espéranto-France deziras dungi laŭ "service civique" volontulo(j)n en la sidejo kiel faras la Tuluza klubo. Neniu membro sin proponas dum la kunsido por prizorgi la volontulo(j)n.

KONKLUDO

La tagordo estas fintraktita. La prezidanto dankas ĉiujn partoprenantojn. La ĝenerala asembleo finiĝas je tagmezo.